EKO 2022
Esperiga Komuniko
Subtene al la regiona, landa kaj loka agado
UEA ilei IF EF
Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 44>** ● UK-eroj ● Tanzanio ● UEA-Arkivo ● Hungario **< aŭgusto 12**

# Novaĵoj el la UK

Sabate la 6-an de aŭgusto 2022 komenciĝis la 107-a Universala Kongreso en Montrealo kun 837 aliĝintoj el 56 landoj. Ni raportas erojn el la Universala Kongreso, nun okazanta.

## Afrika kunsido en la UK

Ĵus okazis hibride la tradicia afrika kunveno kadre de UK. Partoprenis la kunvenon ĉeeste duondeko da kongresanoj kaj rete dekoj da afrikaj esperantistoj el Benino, Burundo, DR Kongo, Tanzanio kaj Togolando. Okazis vica prezento pri agadoj en Benino far François Hounsounou, pri la 8-a Afrika Kongreso ĉi-jarfine en Senegalo fare de Adjévi Adjé kaj pri Tanzanio - probable la lando de la 109-a UK - de John E. Magessa kaj Costantine Mashauri, sekretario de la nova tanzania asocio (EATA). Dumkunvene leviĝis demandoj kaj respondoj fare de afrikanoj kaj ankaŭ estis kontribuoj diversteme de partoprenantoj, el kiuj Jeremie Sabiyumva, reelektita afrikano en la nova estraro de UEA.

Estis eta atingo kaj ni kore dankas al Francesco Maurelli kaj volontuloj, kiuj helpis por aranĝi lastmomente la teknikan aspekton de la kunveno. Ili tiel alproksimigis nin en la kontinento al la okazanta kongreso en Montrealo.

**PS:** Dum estis dissendata la ĵus sendita raporto, venis ĝojiga novaĵo: Esperanto-Asocio de Tanzanio (EATA) estis akceptita de la Komitato kiel aliĝinta landa asocio de UEA. Tiel ĝi estas la 72-a landa asocio de UEA! Gratulon al Tanzanio kaj al ĉiuj, kiuj ebligis tiun atingon!

Adjévi Adje

## Belartaj Konkursoj – rezultoj deklaritaj en la UK.

ĵus okazis en Montrealo la disdono de premioj. Jen filmeto en kiu la BK-Prezidanto, Miguel Fernández, legas la liston de premiitaj verkoj kaj verkistoj.
Vi povas ĝin spekti ĉe:
https://youtu.be/sALpS16S-Ck

mga

### Kongresaj Kurieroj el Montrealo

Eblas elŝuti ilin el https://uea.org/kongresoj

### Nova estraro kun trijara mandato

La Komitato elektis ok-kapan novan estraron de UEA, kun prezidanto Duncan Charters, unua vicprezidanto Fernando Maja, dua vicprezidanto Amri Wandel kaj Ĝenerala Sekretario Aleks Kadar. La ceteraj estraranoj estas Aurora Bute (Rumanio), François Lo Jacomo (Francio), Jérémie Sabiyumva (Burundo) kaj So Jinsu (Korea Respubliko). Ses el sep kandidatoj por komitataneco C estis akceptitaj.

### Pitagora teoremo - prizorgata temo

La scienca programo de la Universala Kongreso en Montrealo estas spektebla ĉeeste kaj rete, per Zoom. Jen unuminuta filmeto anoncanta mian prelegon pri la teoremo de Pitagoro: https://youtu.be/6wCsUpO0V_E

François LO JACOMO

## La ĝisnuna estrarano de UEA pri kongresoj vizitis Tanzanion esplorcele

Fine de julio 2022, venis al Tanzanio la estrarano de UEA pri kulturo, kongresoj, biblioteko kaj eldonado  d-ro Orlando Raola por esplori la pretecon de Tanzanio gastigi la Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2024, kiu estas planata okazi unuafoje en Afriko.

S-ro Raola vizitis kelkajn urbojn en Tanzanio kie loĝas esperantistoj: Dar-es-Salaam, la insulo Zanzibaro, Aruŝa, kie jam estas proponita kongresejo kaj kie d-ro Raola renkontis agantojn en turismaj instancoj, kaj Mwanza (la dua plej granda urbo de la lando) apud la bela plurlanda lago Viktorio, kun bonaj faciligoj por subteni UKon. Laste li vizitis la urbeton Bunda, kie okazis la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto, kie aktivas lokaj esperantistoj, sed, kiu mem ne havus la kapaciton por UK. La foto de AKE 6 estas ĉe mi ĝis nun ne aperigita foto el AKE 6.




Li atingis la urbon Aruŝa, kiu estas proponata kiel kongresurbo de la UK 2024. D-ro Orlando Raola kun la gastemaj esperantistoj de Aruŝa havis longan tagon vizitante ŝtatajn organizojn kaj kompaniojn kiuj okupiĝas pri turismo en Tanzanio, kaj sukcesis renkonti reprezentantojn jene:

i. La urbestron de Aruŝa *(nacilingve: Arusha)*
ii. Tanzanian Turisman Organizon kaj respondeculon pri Naciaj Parkoj

iii. konservan areon Ngorongoro
vi. Aruŝa Internacia Konferenca Centro
vii. Reprezentanton de la Hotelo Ngurdoto kaj ĵurnalistojn

La ŝtataj institucioj prezentis siajn ofertojn al la turistoj kaj kion ili faros se la kongreso venos al Tanzanio.

Ŝajne respondo al la demando ĉu Tanzanio pretas okazigi la UK-on estas JES! Laŭ la vizito de d-ro Orlando oni povas vidi kiel la esperantistoj en la tuta lando pretas gastigi la kongreson kaj ankaŭ atestas kiel la lando mem estas preta por la kongreso. Ne nur la urbo Aruŝa sed la tuta lando bonvenigas turistojn, kion rekomendas la prezidento mem, kiu starigis specialan programon por bonvenigi turistojn en la lando.

Nome de la Tanzania esperantistaro kaj nome de la estraro de la Esperanto-organizo en Tanzanio mi bonvenigas la kongreson al Tanzanio.

Preparis: JOHN E. MAGESSA

## La arkivo de UEA transiras al la Aŭstria Nacia Biblioteko

En 2021 la Komitato de UEA akceptis la rekomendojn de la Estraro, Komisiono pri Financo kaj konsilantaj komisiitaj fakuloj, ke la Arkivo de UEA kaj neduoblaĵoj de la Biblioteko Hector Hodler, kiuj troviĝas en la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo, estu transdonitaj al la Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB) en Vieno. La CO ne havis fizikajn kondiĉojn tiajn, kiajn havas profesia institucio kiel ANB por la konservo de tiuj materialoj, nek disponas fakulojn por ilia katalogado kaj traktado.

En la unua semestro de 2022 UEA kaj ANB kompletigis la unuan etapon de tiu laboro, nome la unuan identigon kaj transporton de la materialoj de Roterdamo al Vieno. La transdono okazis surbaze de donackontrakto, kiu certigas la konservadon de la donitaĵoj fare de ANB **por ĉiam** kaj laŭ la internaciaj normoj adoptitaj por la administrado de palpeblaj moveblaj kulturaj heredaĵoj, kiel estis identigitaj la arkivo kaj ĉiuj donacitaj materialoj fare de UEA. Laŭ agnosko de ANB la Arkivo de UEA estas “mondskale unu el la plej ampleksaj kaj gravaj arkivoj pri Esperanto kaj la internacia Esperanto-movado. ! [...] La UEA-arkivo elstaras per sia abundeco kaj diverseco. Ĝi enhavas arkivaĵojn same kiel ampleksajn kolektojn de afiŝoj, fotoj kaj aŭdvidaj dokumentoj. Tiel ĝi ebligas profundajn kultursciencajn kaj filologiajn esplorojn pri Esperanto”.
Unu el la celoj de la transdono estis, ke la materialo fariĝu pli strukture kaj profesie disponigata al esploristoj, kio ne povis rutine okazi en la CO pro manko de katalogo, strukturo kaj laborfortoj. Efektive la dua etapo de la laboro estas la finkatalogado kaj disponigo, inkluzive de ciferecaj kopioj, al la interesata publiko. Laŭ ANB “aldone al la ĉiutagaj taskoj la bibliotekistoj en la Esperanto-muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj nuntempe paŝon post paŝo alirebligas tiun valoran trezoron por la publiko. Unuaj dokumentoj jam estas katalogitaj kaj ciferecigitaj. La arkivaĵoj estas ankoraŭ en la originaj skatoloj, kiuj estos ŝanĝitaj per novaj sen-acidaj skatoloj; interesitoj kaj esploristoj jam nun povas peti inventarliston de la arkivo kaj mendi dokumentojn por studado en la legosalono de la Esperanto-muzeo”.

“Inter la libroj estas la unuaj lernolibroj en la araba (Kairo 1904), greka (Samoso 1907) kaj kartvela (Tifliso 1909), kiuj bone montras, ke Esperanto jam antaŭ la unua mondmilito disvastiĝis ekster la pli grandaj Eŭropaj lingvo-komunumoj. La arkivo enhavas multnombrajn dokumentojn pri UEA kaj la Esperantomuzeo de ANB. La en

1927 fondita Esperanto-muzeo estas mondskale unu el la plej tradiciriĉaj lingvo-muzeoj kaj unu el la plej gravaj siaspecaj institucioj. La muzeo kun la alligita Kolekto por Planlingvoj dokumentas ĉirkaŭ 500 planlingvajn projektojn. Per pli ol 150 mil dokumentoj kaj objektoj, inter ili 75 personaj kaj instituciaj arkivoj, la kolekto konservas kaj disponigas la plej ampleksan fakbibliotekon pri Esperanto, planlingvoj kaj interlingvistiko en la mondo". La transdono okazis sen kostoj al UEA kaj plenumas diversajn atendojn pri profesia traktado de la Arkivo kaj rilataj materialoj! UEA aparte dankas al la teamo de la Esperanto-muzeo pro la altnivela kunlaboro por tiu atingo.

## Ekzamena novaĵo malbonvena el Hungario

La registaro nuligas la devon fari universitatan lingvan ekzamenon. Ekde aŭtuno 2024, la registaro transformos la superan edukan agnoskosistemon kaj abolos la lingvo-ekzamenan postulon, anoncis la ministro pri Novigado kaj Kulturo, János Csák, en sia fejsbuka paĝo.

En la nova sistemo, altlernejoj povos decidi pri 100 poentoj ene de la 500-poenta akceptosistemo. Ĉi tio povas esti aljuĝita aŭ surbaze de parola ekzameno aŭ surbaze de sporto, arto aŭ ajna alia socia agado. La institucioj ankaŭ povas decidi en kiuj kazoj ili atendas altnivelan diplomiĝon en la diplomiĝaj temoj kiuj povas esti enkalkulitaj dum la diplomiĝa poentokalkulo. La altlerneja kandidatiĝo-sistemo ne ŝanĝiĝos: ankoraŭ eblos kandidatiĝi por ses lokoj, krom la 100 instituciaj poentoj, 100 poentoj estas aljuĝataj por mezlernejaj sciencaj rezultoj kaj 300 poentoj por mezlernejaj diplomiĝaj rezultoj. Ankaŭ la deviga lingvo-ekzamena devontigo estas forigita, anstataŭe "la universitatoj devas certigi la taŭgajn lingvajn kompetentecojn dum la trejnado".

István Szabolcs

## Libroj el Flandrio atingis Etiopion

Hieraŭ mi recivis naŭ libretojn de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL).
SMG: Solidareco aganta!

Htesfamicael Htesfamicael (<htesfamicaelhtesfamicael@gmail.com>)

========= vortoj: 1335 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.